

204 SIFRIRIO

El la enhavo:

Lančov 50-jara
IKUE-kongreso Kroměříž
Nova PIV
87-a UK Fortalezo
10-a kongreso de ĈEA
Lingvaj ludoj 11
Enciklopedio Vikipedio
Alvoko de UEA

3
2002

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



El turista renkontiĝo en
Plasy

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),
rete Starto: starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:**
cea.polnický@quick.cz (sekretario)
podhradska@volny.cz (prezidanto)
www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membroklotizoj: A 250 Kč, B 150 Kč, D 70 Kč, E 70 Kč, F 5000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

Sekcioj de ĈEA: junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informatiko

Komisionoj de ĈEA: ekzamena, gazetara-informa

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA:

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 25771 2126 chrdle@kavapech.cz, (eldonado, UEA, subvencioj)

Vicprezidanto: Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj), e-mail: repasyn@iol.cz, tel. 338 324 287, 0602 800214

Sekretario: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz (kontakto, membrobazo)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencioj, seminarioj), tel. 220 879 386

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov-Město, tel. 696 815 253, zd.heiser@post.cz (EK)

Komitatano-ĉefdelegito de UEA: Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, 222 780 677

Kontrolgrupo de ĈEA: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vapkce.cz, 466 401 942; Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, starto@clavis.cz

Kontrollegis: V.Kočvara, M. Pastrňák, V. Podhradská, P. Polnický

Esperanto-muzeo: Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová, muzeum.ct@worldonline.cz

Abonoj de gazetoj: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 631 332 278, fakso 631 332 507, vlada_hasala@iol.cz

55-a Kongreso de IKUE

En la tagoj de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2002 okazis en urbo Kroměříž 55-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. En Ĉeĥa Respubliko okazis jam kvar kongresoj de IKUE: La 14-a okaze de sanktveneslaa milenio en la jaro 1929 en Prago, la 18-a en la j. 1936 en Brno, la 48-a en la jaro 1995 en Olomouc kaj la 55-a ĉi-julie en Kroměříž. Aranĝanto de la nunjara kongreso estis same kiel en la jaro 1995 la IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA.

La urbo Kroměříž estis bonŝance elektita kiel kongresurbo kaj la Ĉefepiskopa Gimnazio kiel kongresejo kun tre favoraj kondiĉoj. Ĉio okazis "sub unu tegmento" en kvietra historia parto de la urbo, en najbareco de Ĉefepiskopa Kastelo kaj ĝardenoj, kiuj estas proklamitaj Mondaj Kulturaj kaj Naturaj Heredaĵoj de UNESCO.

Inaŭguro de la kongreso dimanĉe la 21-an de julio okazis en du partoj. Unue okazis en la apuda gotika preĝejo de sankta Maŭricio esperantlingva Sankta Meso, kiun celebris sep pastroj - partoprenantoj de la kongreso. Dum la Meso en Esperanto predikis Helpepiskopo de Olo-

mouc Mons. Josef Hrdlička. Kromalie li diris: *Mi estas konvinkita, ke ankaŭ familio de la esperantistoj apartenas al tiuj signoj de la tempo, kiuj alportas lumon de la espero kaj ankaŭ la fortan alvokon al unueco de la homoj. En la Biblio estas la vortoj: "Unu Sinjoro, unu kredo, unu bapto". Ni trovos tie ankaŭ la vortojn: "Unu koro kaj unu animo". Ĉe falo de Babilona Turo komenciĝis konfuziĝo de la lingvoj kaj la homoj perdis komunan lingvon. Ili ĉesis sin reciproke kompreni. Male, ĉe descendo de la Sankta Spirito la homoj de malsamaj lingvoj denove komencis reciproke sin kompreni. Ankaŭ Esperanto plenumas kaj disvolvas tiun ĉi pentekostan testamentaĵon. Esperanto ne heroldas nur iun filologian projekton, sed ĝi proponas multe pli: La spiritan vojon de proksimiĝo, amikeco kaj unueco, kiu estas mallarĝe kunigita kun religia dimensio en la koro de la homo. Ĝi kunigas multajn homojn en multaj nacioj kaj enportas en la Eklezion kaj eĉ en la mondon fortan inspiron kaj sanan energion, kiu pruvas, ke la Eklezio vivas kaj vivos ankaŭ en la nova jarmilo.*

La dua parto de la inaŭguro de la kongreso okazis en historiaj spacoj de la Ĉefepiskopa Kastelo en Depu-

titara Salonego. Inter gastoj de la inaŭguro estis reprezentanto de Regiono Zlín, Konsiliano Vojtěch Jurčík, Urbestro de Kroměříž Mgr. Petr Sedláček, Direktoro de Ĉefepiskopa Gimnazio Mgr. Štěpán Bekárek kaj reprezentantoj de ĈEA - prezidantino Věra Podhradská, sekretario Pavel Polnický kaj redaktoro de Starto Miroslav Malovec. La urbestro kaj la direktoro de Ĉefepiskopa Gimnazio prezentis siajn salutparolojn esperantlingve. Precipe la bona prononcado de la urbestro meritis longan aplaŭdon de la kongresanoj. La historia nobleca salono de la kastelo multe kontribuis al la vere solena inaŭguro.

La programoj de la kongreso estis diversvariaj. Dimanĉe posttagmeze vizito de historiaj vidindaĵoj de la urbo Kroměříž, vespere sekvis belega programo de folkloro ensemblo LIPINA danke al membro de IKUE-Sekcio Inĝ. František Havlík. Lunde kaj vendrede antaŭtagmeze okazis prelegoj pri la kongresa temo: "Malfermu la Pordon al Kristo!". Krom tio lunde antaŭtagmeze akceptis delegacion de 15 reprezentantoj el ĉiuj ĉeestantaj landoj la urbestro en la Urbodomo. Lunde posttagmeze oni vizitis Florĝardenon, kiu ankaŭ apartenas al

Monda Natura Heredaĵo de UNESCO. Dum vespera Pola Programo sin prezentis ĉeestantaj polaj E-poetoj. Marde antaŭtagmeze okazis vizito de nepre vidinda Ĉefepiskopa Kastelo kaj posttagmeze pilgrimo al Sankta Hostýn, kie kiel ĉefcelebranto de esperantlingva Meso estis la emerita ĉefepiskopo de Hradec Králové Mons. Karel Otčenášek, kiu ankaŭ prezentis tre interesan kaj aktualan homilion en Esperanto. Merkreda antaŭtagmezo estis destinita por okazigo de Ĝenerala Kunveno de IKUE. Posttagmeze oni povis viziti Ĉefepiskopajn Vinkelojn kaj tuta jaŭda tago estis disponigita al tuttaga perbusa ekskurso al Moravia Karsto. En Baziliko de Křtiny okazis la Meso kaj post ĝi vizito de Grotaro de Punkva kaj Macoĥa. Vendrede, krom jam menciita prelega antaŭtagmezo, okazis la danko Meso en preĝejo de V. Maria en Kroměříž kaj vespere adiaŭa vespero kun bunta programo de la kongresanoj. Nu kaj sabate post fermo de la kongreso la kontentaj kongresanoj adiaŭis la kongresurbon.

La 55-a Kongreso de IKUE enskribiĝis en la historion de la IKUE-Kongresoj denove per oraj literoj. *Miloslav Šváček*

Diverseco ŝanco, ne minaco

Tia estis la ĉefa temo de la 87-a Universala Kongreso de Esperanto en la brazila urbo Fortaleza (3-10 aŭgusto 2002). La kongreso atingis 1484 partoprenantojn, kiujn bonvenigis la urbestro Juraci Magalhães. Alta protektanto estis Beni Veras, guberniestro de la ŝtato Cearao.

La 14 salonoj estis nomitaj laŭ gravaj esperantistoj, inter ili ankaŭ F. V. Lorenz. La programo enhavis 165 programerojn, krom prelegoj ankaŭ du teatraĵojn (*Amo per proverboj*, *Domo, kiu timigis*), nacian vesperon, baledon *Du jarzonoj*, koncertojn de Flávio Fonseca (ni konas lin el Prago), de grupo Merlin kaj de gitaristo Tarcísio Lima. La Kongresa Universitato alportis variajn prelegojn (*Natura semantiko kaj kultura sintakso*, *La elĉerpiĝo de enprizonigo kaj la efika respondo de alternativaj punoj*, *La rolo de la kultura diverseco en la agado de AIS*, *La revolucio de voĉo*, *Esperanto-poetoj pri Esperanto*, *Korodo de metaloj kaj kontraŭkorodaj metodoj*, *La inkaa astronomio*, *Holografia televido*, *Semiotika taksado de lingvo artefarita*, *La modernaj dentaj implantoj*).



87-a Universala Kongreso
de Esperanto
Fortaleza-Brazilo
03-10 aŭgusto 2002

KONGRESAJ IMPRESOJ

Kelkajn interesajn impresojn sendis usona esperantisto Boris Kolker:

En kiu UK gejunuloj konsistigas trionon de la partoprenantaro? En kiu UK oni povas vidi dekojn da knaboj kaj knabinoj, junuloj kaj junulinoj en verdaj ĉemizoj kun la kongresa emblemo, ĉiam pretaj por helpo? Kie troveblas tiom da entuziasmaj kaj idealismaj esperantistoj? Kie lokaj esperantistoj salutas konatajn kaj ekkonatajn homojn per kiso kaj brakumo? En kiu UK oni ne kontrolas kongresanecon antaŭ la vesperaj koncertoj, tiel ke ilin povas viziti tutaj familioj, inkluzive bebojn kaj grandaĝajn avinjojn? En kiu Esperanto-aranĝo eblas spekti dum koncerto spirhaltigan kaj dancigan karnavalon? En kiu UK la publiko reagas al kantoj per aplaŭdegoj, aprobaj fajfoj kaj krioj, kvazaŭ en futbala matĉo?

Kie gitarantaj kanzonistoj sukcesas kunkantigi milopan aŭskultantaron?

Ah, Fortaleza! Senfina bluverda oceano borderita de senfinaj plaĝoj el ora sablo. Palmoj kaj aliaj ekzotaj arboj. Niaj altaj hoteloj en laŭoceana promena strato. Temperamentaj, gajaj, amikiĝemaj, bonvolemaj brazilanoj. Ŝoforoj, zigzagantaj inter aŭtoj kaj mirakle sukcesantaj tuŝi neniun. Ah, tropikaj fruktoj! Ah, brazila kafo! Ah, brazilaj vinoj!

El la Malferma Parolado

* Pluraj realistoj konkurencas, por deklari, ke la historio de la homaro finiĝis, kaj ke prefere oni estu realisma kaj akceptu la realan situacion. La lingva flanko de tio estas en la admonoj, kiujn ni aŭdas ĉiutage: "Ho ĉesu! La angla jam venkis!".

Mi kredas, ke la realistoj eraras, kiel ili ĉiam eraris. Ili asertis, ke estas ridinde pensi, ke kristana religio konkeros la roman imperion, ke estas ridinde pensi, ke la grandaj potencaj landoj liberigos siajn koloniojn. Do, mi pensas, ke ankaŭ nun realistoj malpravas, kaj ke la nunaj potenco-rilatoj en la mondo ne estos eternaj. Ĉiukaze, kaj sendepende de la situacio nuna aŭ estonta en la mondo, ni nun kiel antaŭ unu jarcento rifuzas la logikon, pro kiu fortuloj rajtas altrudi al malfortuloj sian kulturon kaj sian lingvon. Ni estas movado por diverseco en la mondo.

* La Esperanto-movado kreskas. Vi devas fidi min, ĝi kreskas. Se ne estus tiel, mi ne ricevus peton pri inaŭgura artikolo de la mongolaj aŭ de la iranaj esperantistoj. Se ne estus tiel, mi ne estus petata daŭre vojaĝi tra Eŭropo jen por inaŭguri la novan sidejojn de la Brita Esperanto-Asocio, jen por instrui en univer-

sitataj kursoj en Pollando, jen por paroli al hispanaj kongresanoj. Se ne estus tiel, mi ne devus okupiĝi pri la lernolibroj, kiujn oni devas uzi en Zambio aŭ ĉe la afganaj rifuĝ-intoj, kiuj lernas Esperanton.

* La Esperanto-movado kreskas ankaŭ alimaniere. Ekzistas amaso da homoj tra la mondo, kiuj renkontas Esperanton ne plu ĉe la tradicia kurso (ĉiun jaŭdon vespere je la 6-a en la sidejo de la loka klubo), sed en la mondo de la komputila reto.

Tiuj homoj havas aliajn lojalecojn kaj aliajn bezonojn. Ili apenaŭ komprenas, kial homoj volas renkontiĝi kun aliaj homoj en difinitaj ejoj, al kiuj oni devas vojaĝi en malrapidaj aŭtobusoj tra la urba trafiko. Ili apenaŭ komprenas, kial homoj volas partopreni universalajn kongresojn en foraj landoj kun tedaj festparoladoj, kiujn oni devas aŭskulti ĝis la fino sen eblo simple forviŝi ilin.

* En la vivo de E-organizaĵoj kaj esperantistoj gravas la duopo: - produkti esperantistojn - produkti servojn por esperantistoj.

* La registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta.

Renato Corsetti

Kongresa Temo

En dimanĉo, mardo kaj ĵaŭdo okazis kunsidoj pri la kongresa temo, **Diverseco - ŝanco, ne minaco**. Ĉeestis pli ol cent homoj.

* La partoprenantoj konstatis, ke estas kaj bonaj kaj malbonaj aspektoj de la tielnomata "globaliga" procedo, kaj ke ili ofte estas du flankoj de la sama fenomeno. Do, novaj teknologioj alportas siajn bonajn rezultojn: pli da informoj pri la mondo ĝenerale, alproksimiĝo de la homoj kaj facila komunikado. Tamen kelkaj landoj ankaŭ spertas pro la novaj komunikiloj hegemonian dominadon de la amasmedioj, fare de eksterstarantoj, kaj la trudon de fremdaj kulturaj produktoj. Tutmonda ekonomia sistemo alportas kaj eblecojn por evoluo kaj disvolviĝon (kune kun la avantaĝoj de grandskala produktado), sed pli kaj pli la grandaj entreprenoj, ignorante la landlimojn kaj la potencon de la registaroj, faras gravajn sociajn decidojn kaj trudas tiujn decidojn eleksterĉ. La sano de la homaro pliboniĝas; sed kiu regas la prezon de la necesaj medikamentoj? Ĉu ekonomia hegemonio povas veni lingva hegemonio, kaj novaj eblecoj de edukado povas akceli la malaperon de tradiciaj kaj lokaj

kulturoj. Mondmilito estas eble pli facile evitebla, pro la komercaj ligoj inter la landoj, sed la fortaj landoj pli facile manipulas la malfortajn.

* Dum la pasinta dudeko aŭ trideko da jaroj en multaj landoj oni fariĝis pli konscia pri la neceso konservi la diversecon ene de la diversaj socioj kaj pli tolera pri lingva kaj kultura diverseco.

* Tamen la politikoj en la diversaj landoj restas tre variaj. En kelkaj landoj la lingvaj rajtoj de minoritatoj estas tre minimumaj, se ili entute ekzistas; kaj en aliaj, la programoj, kiuj celas helpi la minoritatojn, estas neefikaj pro korupto aŭ pro forsuĉo de rimedoj por aliaj celoj.

* Necesas distingi inter la rajtoj de, kaj respondecoj antaŭ indiĝenaj grupoj kaj la rajtoj de, kaj respondecoj antaŭ enmigrintaj grupoj. Oni povas argumenti, ke ĉe indigenaj grupoj ekzistas certaj teritoriaj rajtoj al lingvo kaj kulturo, kiuj ne ekzistas ĉe enmigrintoj.

* Tamen povas ekesti certa konflikto inter la demokratia principo kaj la teritoria principo, en tio, ke difinitaj popoloj povus esti traktataj diversmaniere depende de la geografia situo kaj sekve ne ĝui rajtojn egalajn al tiuj de aliaj civitanoj.

* Ĉe enmigrintoj, la registaroj malmulton faras por konservi la scion de la gepatraj lingvoj, ĉar ili favoras integriĝon aŭ asimiliĝon. Ili eventuale tiel perdigas al si lingvosciajn rimedojn valorajn por la evoluigo. Aliflanke, la emo de enmigrintaj grupoj ne integriĝi lingve kaj kulture foje kaŭzas reziston kontraŭ enmigrintoj.

* Eĉ la plej belaj garantioj pri minoritataj rajtoj malmulton signifas, se infanoj ne havas aliron al edukado en la gepatraj lingvoj kaj pri la gepatraj kulturoj, aŭ al edukado entute.

* En la moderna mondo apenaŭ eblas ignori la diverslingvecon eĉ ene de unuopaj ŝtatoj. Nepras, ke ĉiu ŝtato havu klaran politikon pri tiu demando, kiu ne estu limigita al nura unulingvismo kaj kiu agnosku kaj apogu iun gradon de lingva diverseco.

Humphrey TONKIN



KONGRESA REZOLUCIO

La 87-a UK kun 1484 partoprenantoj el 58 landoj, kun la temo "Diverseco - ŝanco, ne minaco",

Konstatas, ke la daŭranta integriĝo tutmonda kondukis al pozitivaj rezultoj, ekzemple internaciaj instrumentoj pri homaj rajtoj, sed ankaŭ al malegalecoj kaj al la ĉiam pli rapida perdiĝo de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj,

Gratulas UNESKOn pro ties agado sur la kampo de lingva kaj kultura diverseco, ekzemple per la Tago de la Patrino Lingvo je la 21a de februaro ĉiujare, kaj aparte bonvenigas, ke la Ĝenerala Konferenco alprenis je la 2a de novembro 2001 Universalan Deklaracion pri Kultura Diverseco,

Konstatas, ke la principoj kaj celoj de UNESKO en tiu kampo kongruas kun la idealoj de la movado por Esperanto, kiu celas per neŭtrala komunikilo transponti la kulturojn, tiel kreante forumon por egaleca interŝanĝo de kulturaj valoroj,

Atentigas en tiu kunteksto pri la graveco de la lingva dimensio de kultura diverseco, kaj substrekas la pretecon de la Esperanto-movado kunlabori kun ĉiuj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri la kultura dimensio en internaciaj aferoj.

Koncize el UK Fortalezo:

* **Novaj Honoraj Membroj de UEA:** Evaldo Pauli (*Brazilo*), Kathleen Hall (*Britio*), Kyotaro Deguci (*Japanio*) kaj Hans Bakker (*Nederlando*).

* **Belartaj Konkursoj** (parenteze nombro da konkurajoj)

- *Infanlibro de la jaro* (3): **1.** "Kuniberto kaj Kilevamba" (G. Pausewang, tradukis Nora Caragea).

- *Prozo* (18): **1.** "Sekretoj" (Paulo Sérgio Viana, *Brazilo*); **2.** "Malsukceso" (Dani Spielhofer, *Aŭstrio*) kaj "Pro savo de Homo" (Lena Karpunina, *Germanio*).

- *Teatraĵo* (3): premioj ne aljuĝitaj.

- *Poezio* (46): **1.** "Floraj haikoj" (Anatole Taras Lubovich, *Usono*); **2.** "Kio okazis?" (Anja Karkiainen, *Finnlando*); **3.** "Arte fari" (Marie-France Conde Rey, *Francio*).

- *Eseo* (5): **1.** nealjuĝita; **2.** "Mezuro de informo-kvanto" (Christian Riviere, *Francio*); **3.** "Diverseco: defio, ne minaco" (István Ertl, *Belgio*).

- *Kanto*: **1.** "Preĝo el inter ruinoj" (Anatole Taras Lubovich, *Usono*); **2.** "Homarano" (Alejandro Cosavella, *Argentino*); **3.** "Jula enigmo" (muziko: Christian Spitzer kaj teksto: Christian Riviere, *Francio*).

- *Vidbendo*: **1.** "Plurspecaj eroj" (Sylla Chaves, *Brázilo*); Honora Mencio: "Feliĉ Romuliana" (E-grupo de Zajecar, *Serbio*).

"**Esperanto, pasporto al la tuta mondo**" finfine finita! Entute 16 kolorplenaj 30-minutaj video-lecionoj de D-ro Paul Gubbins. Aŭdiĝas nur Esperanto.

* **Nova elektokomisiono.** La Komitato

elektis tripersonan Elekto-Komisionon: s-ro Takeuti Yosikazu, *Japanio*, s-ino Edvige Tantin Ackermann, *Italio*, nored@estelnet.it, s-ro Povilas Jegorovas, *Litovio*, pjegorovas@takas.lt. Dum posta kunsido, la Komisiono decidis, ke:

1. Takeuti ĝin prezidos;

2. oni kontaktos la Landajn Asociojn por interkonsiliĝo pri iliaj reprezentantoj antaŭ UEA;

3. oni ekzamenos la konsiston de la Komitato kaj la partoprenon kaj engaĝiĝon en la diversaj kampoj de la unuopaj komitatanoj;

4. oni informos pri elekto-reguloj de eventualaj novaj Komitatoj C de UEA.

* **La Knabo Frenozeta**, retversio de la libro verkita de Ziraldo (famega brazila desegnisto) kaj esperantigita de Kristoĉjo Rezende, tiam 9-jara, estis inaŭgurita dum la 87-a Universala Kongreso. Vizitu: www.utopia.com.br/esperanto/ziraldo

* **La inkaa astronomio.** Preleginte pri la fascinaj linioj de Naska (*Peruo*) Amri Wandel donis al la 135-nombra spektantaro la bonan novaĵon pri la apero de nova Almanako (ĉi-foje temanta precipe pri la sunsistemo). Helpe de lumbildoj Wandel esploris la plurajn teoriojn, kiuj provas klarigi la celon de la linioj (el kiuj la plej akceptata estas tiu de astronomia kalendaro). Poste li rakontis pri la "forkego de Pisco", la suntemplo (laŭ kelkaj, astronomia observatorio) en Maĉu Pikĉu (ambaŭ en *Peruo*) kaj pri la granda idolo de Tiahuanaco, situanta en *Bolivio*. Li menciis ankaŭ la modernajn grandajn teleskopojn en la nordo de Ĉilio.

La nova PIV

(SAT, 2002)

La nova eldono, kiun ĉefredaktis akademiano Michel Duc-Goninaz, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpigataj en la teksto mem. Formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj. Eldonis SAT. Produktadon prizorgis nia KAVA-PECH. Prezo ĉe UEA 78 EUR (plus sendokostoj). Kelkajn ekzemplerojn por ĈEA-anoj proponas nia libroservo (vidu p. 82).

Opinioj pri la nova PIV

Jam dum la prilaborado de la nova versio aperadis kritikoj kaj kontraŭaj opinioj. Laŭ unuj E-o ne estas dialekto de latino kaj rajtas havi propran evoluon, laŭ aliaj ĝi ne rajtas ŝanĝi internacie kodifitan scienca nomenklaturon.

Opinio de Josef Kavka

Kiel estis atendeble, ĝi ne nur konservas la malnovajn pekojn kontraŭ la fundamenta Esperanto kaj kontraŭ la scienca leksiko, sed eĉ prezentas novajn, multe pli gravajn.

1. Dishakado de integraj radikoj

Spite al plurfoja akcentado fare de renomaj ekspertoj (*Blanke, Krause* k.a.), la nova PIV generis kondamندان procedon: Novajn, internacie neekzistantajn terminojn ĝi akiras per dishakado de radikoj, ĝis nun **integraj**. Por ekzempli, mi menciualmenaŭ tri "radikojn", kiujn vi vane serĉus en internacia scienca literaturo: "antrop/o, petr/o, spele/o". Normale oni renkontas ilin kiel **sciencajn pseŭdo-prefiksojn** kun la respektivaj signifoj: homo, rok(aĵ)o, kaverno, ekz. **antropologio, petrologio, speleologio**, kun ties koneksa termin-plejado.



Ke pro tiaspeca dishakado PIV falas en la propramane konstruitan kaptilon, evidentiĝas ekz. sur la "radiko petr/o": la fundamentaj petrolo, petromizo kaj petroselo ne estas "analizeblaj", do ne povas aperi enkadre de la nesto "petr/o". Tie jes troviĝas ekz. "-ografio". Ĉu do petrografo, analoge al la oficiala geografo, estas analizebla ĝis "petr/o" kaj "graf/o"? Jen totala konfuzo de la tradicia koncepto pri Esperanto-radikoj!

2. Lanĉado de kuriozaj novismoj

Por ne troŝarĝi la kadron de tiu ĉi

artikoleto, mi menciuj unusolan ĥemian kombinaĵon "siliciaton", laŭ la nova PIV "salo de siliciata acido". La internacie kodigita formo **silikato** estas difinita kiel "tradicia nomo de siliciato". Konsekvence, ankaŭ la de tutmondaj ĥemiistoj aplikata **silicido** rebaptiĝas al "siliciido". Bonŝance por Zamenhof, oni ne aŭdacis rebapti la fundamentan **silikon** per "siliciiko". Aliflanke, la novPIVuloj senĝene rifuzas multajn internaciajn terminojn, lanĉante ekz. "aluminisiliciaton" anstataŭ **alumino-silikato**, "ringsiliciaton" anstataŭ **ciklosilikato** k.t.p., k.t.p. Evidente, la kodigitaj terminologioj (kristalo)-ĥemia, mineralogia, petrologia k.a. ne estas relevantaj por la nova PIV.

3. Pli intensa atenco kontraŭ la fundamenta fonetiko de Esperanto

La origina PIV, redaktita fare de *Waringhien*, procedis pli modere, en komparo kun la nova. Ne sufiĉis, ke restu la fortimiga baraktado inter Ĥ kaj K (ekz. "polistiko" kaj stihometrio), sed la obstina K-manio progresis jam al perfortado de nomenklaturaĵoj: dolihoto = "dolikoto", ĥiropteroj = "kiropteroj" k.t.p. La zamenhofa ĥirurgo referencas al "kirurgo", la fundamentaj iĥtiokolo = fiŝgluo, ĥaoso = "kaoso". Jen vera ĥaoso ...

La alergio kontraŭ Ĥ foje kondukas, spite al la fontlingvaj originaloj, ĝis Ĉ: "ĉimo" anstataŭ ĥimo,

"Kolĉiko" anstataŭ Kolĥido, "kolĉikino" anstataŭ kolĥicino, k.t.p.

4. Resume

Antaŭ kvar jaroj mi ĝentile atentigis la PIV-redakcion, ke ĝi ne respektas la internacian scienca leksikon kaj ke tiom malpli gravas por ĝi la jam estimde vasta scienca literaturo esperantlingva. Vane: ili persistis en sia senbrida eksperimentado. Nekompetentaj pri ĥemio, mineralogio, kristalografio, petrologio kaj ceteraj fakoj, ili restis konvinkitaj, ke Esperanto kapablas trudi al la sciencoj sian "plibonigan" recepton de terminfarado.

Jam tiutempe liciis rememorigi la redaktantojn pri la latinaĵo: *Errare humanum, in errore perseverari diabolicum est.* (Eraro estas homeca, persistado en eraro estas diableca.)

Fine trafu pri la nova PIV jena heksametro:

Ut desint vires, tamen est laudanda voluntas. (Kvankam mankas la fortoj, tamen estas laŭdenda la bonvolo.)

La bonvolo kaj diligenteco eble ne mankis, sed jes la faka kompetenteco kaj terminologia erudicio. Tragedie por la scienca reputacio de Esperanto.

Rimarko de la redakcio:

relevanta gravega (*internacia esprimo*)

Knabinoj el Česká Třebová en Skotlando kaj Anglio

Sep knabinoj kun gitaristo Pavel kaj mi reveturis komence de julio el Skotlando kaj Anglio. Ni estis invitetaj de organizacio NoJEF el Oksfordo subtenanta junajn gesamideanojn ĝis 26 jaroj. Invitleteron sendis al ni ĝia sekretario doktorino Kataline Hall.

Unua prezentado de E-grupo el Česká Třebová estis en E-klubo en Londono baldaŭ post alveturo de grupo. Poste ni daŭrigis en Glasgovon kaj loĝis en proksima urbo Coatbridge. En Skotlando montris al ni multajn interesajojn mia leteramiko katolika pastro Charlie Dornan: artefaritan lagon, banlokon de romaj soldatoj, urbon Ayr kun la maro de verkisto R. Burns, pilgrimlokon "Skota Lourdes", amuzparkon, ministan muzeon ... La knabinoj sin prezentis matene en lernejo por infanoj, vespere en preĝejo por geparohanoj kaj esperantistoj. Antaŭe ili montris irlandajn dancojn al ni kaj al aliaj ĉeestantoj malgrandaj knabinoj el Coatbridge kaj ludis sakŝalmisto.

Post kvin tagoj ni forveturis kun Jenny en ŝian loĝlokon Painswick.

Pro ŝia malsano ni ne povis tie resti kaj ni loĝis en vilaĝo Upton, ĉe Elizabeth Stanley. En proksimaj urboj Stroud kaj Gloucester nia grupeto prezentis sin per dancoj, kutimoj, fabeloj kaj kantoj. Interesa por ni estis unua lernejo, kiun vizitadis infanoj el arabaj, hindaj, nigrolaj kaj blankulaj familioj. Tie ni vidis surskribojn en tri lingvoj. En lasta lernejo, kie estis granda salono, kunvenis gelernantoj el kelkaj lernejoj kaj alvenis eĉ redaktoro de ia gazeto. Al infanoj plaĉis fabeloj de knabinoj kaj kantoj de Pavel. Speciale kanto: Dancu, dancu, ne staru... Antaŭlastan tagon ni travivis en Oksfordo, kie gvidis nin doktorino Katalina Hall kaj vespermanĝon preparis por ni E-verkistino kaj bonega kuiristino doktorino Marjorie Boulton. Al ili ambaŭ la knabinoj nur kantis kaj deklamis.

Jam alvenis al ni letero el lernejo en Gloucester kun laŭdo kaj desegnaĵoj de infanoj.

Zdenka Novotná



Renkontiĝo en Svitavy

La 8-an de junio 2002 Klubo de gemikoj en Svitavy aranĝis tradician renkontiĝon. Antaŭtagmeze ni vizitis Moravian ceramikan entreprenon. La direktoro de la fabriko montris ĝin al ni kaj konatigis nin kun teknologio. Produktojn ili eksportas en tutan mondon. Posttagmeze infanoj el Česká Třebová prezentis al ni sian programon. Samideano Kvido Janík rakontis pri sia vojaĝo tra Sudafrika respubliko kaj per video li akompanis sian paroladon. Ĉiuj 29 partoprenantoj el 8 kluboj raportis pri sia agado.

Estantjare nia klubo festos 70 jarojn.

Esperanta klubo en Svitavy

Esperantistoj sur Ĉantorija-monto

Tria dimanĉo en junio estas la tago, kiam - jam ekde 1925 - tradicie kunvenas ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur pinto de Ĉantorija. Nunjare la renkonto okazis la 16-an de julio - la eksterordinare serena tago allogis preskaŭ kvardekon da partoprenantoj. Post la 11-a horo ĉiuj koncentriĝis ĉe kabano staranta rekte sur la ĉeĥa-pola limo. Dank' al magnetofono de Vlado Sládeček ni ekkantis specialan himnon, verkitan por tiu okazo. En nomo de Pola E-Asocio salutparolis Alexander Zdechlik, poste reprezentantoj el Ostrava-Vítkovice, Poruba, Vigla Ezoko, Opava, Bielskô-Biala, Gliwice, Cieszyn, Krzeszowice, Sošnowiec kaj Zakopané informis pri freŝaj aktualaĵoj kaj disdonis invitilojn. Fine ni tostis per biero promesante reveni post

unu jaro kaj aranĝi renkonton ankaŭ en la pola Ustroń (kies pitoreskan panoramon ni admiris), ĉar ne ĉiuj kapablas grimpi sur la monton. Ni rememoris ankaŭ temojn de malpermesoj, kiam kuraĝuloj la renkontojn pagis per karcero.

drkoĉ

Turista renkontiĝo en Plasy

Nova aranĝo sukcesis

Meze de junio okazigis E-klubo Plzeň turisman renkontiĝon en Plasy. Vendrede, tuj post balotoj, venis 15 gesamideanoj en ripozlokon "Máj" kaj prezentigis dum interkona vespero. La informpanelo sur teraso (eminenta!) allogis el aliaj ĉeestantoj de la ripozcentro scivolemulojn - espereble unu el ili komencos lerni Esperanton! Sabate okazis ekskurso per buso al pilgrimloko Mariánská Týnice (iama prepostejo kaj klostro, nun renovigataj, estas tie distrikta muzeo). Dum reveno ekskursantoj haltis por momento en la urbeto Kralovice. Posttagmeze, malgraŭ pluveto kaj fulmotondroj, ni vizitis en Plasy tiean faman konventon kaj vespere rigardis videofilmon pri la regiono, ĝiaj historio, memoraĵoj, naturbelecoj kaj nuntempa vivo. Dimanĉe ankoraŭ al ni s-anino Zýková montris belajn kaj interesajn lokojn kaj konstruaĵojn de fama "turbo de biero". Post tagmanĝo ni adiaŭis kun espero reveni al la agrabla ripozloko kun belega natura medio kaj bongustaj manĝaĵoj. Dankon al la organizanto s-ano Kaprál el Kaznějov!

Mirek Severa

Ekoturisma renkontiĝo en Kvilda (montaro Ŝumava, 11.-16.6.2002)

En junio travivis 20-persona grupo belegan semajnon en unu de la plej belaj turismaj centroj Kvilda meze de la nacia parko en Ŝumava. Partoprenis 4 germanoj, 1 s-ano el Belgio kaj 15 ceteraj el Ĉeĥa Respubliko. Al Kvilda ni ĉiuj alveturis dum la lundo. Iuj de ni loĝis en pensiono "Pohoda" kaj 9 personoj loĝis en tranoktejo, kie ni estis tre kontentaj.

En pluaj kvar tagoj ni vidis dum gvidataj promenoj plej valorajn vidindaĵojn. Ĉiutage ni migris 10-30 km tra belega naturo de Ŝumava. Ni vizitis ankaŭ la subĉielan geologian ekspozicion, torfmarĉejojn, kelkaj grimpis tra praarbo al pinto de la monto Boubín. La lastan tagon ni iris al la fonto de la rivero Vultavo.

Vendrede ni vizitis muzeon en Sušice. Estis simpatie, ke en la muzeo laboras gvidanto, kiu al ni ĉion klarigis Esperante. Ni estis surprizitaj, ke la gvidfolio krom aliaj mondaj lingvoj estis ankaŭ en Esperanto.

Ĉiujn vesperojn ni travivis

komune. Vesperoj estis dediĉitaj al diversa babilado. Interesa estis prelego pri ekologio (s-ano P. Chrdle) kaj por neesperantistoj aŭ kometantoj (7 personoj) enkonduko al Esperanto (s-anino V. Podhradská). Sabate okazis adiaŭa vespero en pensiono "Ŝumava Inn". Dimanĉe ni adiaŭis kaj kontentaj forveturis hejmen.

Dankon al s-ano Petro Chrdle pro bele preparita unusemajna renkontiĝo en belega interesa naturo.

Jarmila Čejková



15-a Internacia Kultura Festivalo

de la 4-a ĝis la 6-a de oktobro 2002
dediĉota jam tradicie
al Jiří Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumpr

La akceptejo en la restoracio **Na Rychtě** proksime ĉe la ĉefa fervoja stacidomo (150m, tra strato Hradiště apud Ĉeĥa Nacia Banko) funkcios vendrede ekde la 15-a horo.

Vendreda programo:

- * 18.00 interkona vespero
- * 19.00 komuna vespermanĝo

Sabata programo:

- * 8.00 komuna matenmanĝo
(Interhotel Bohemia)
- * 9.30 prelega kaj diskuta matineo
(Dům kultury chemiků, Velká hradební 19)
- * 13.00 komuna tagmanĝo
- * 14.30 homaranisma koncerto
(“Ruĝa preĝejo”)
- * 17.00 komuna vespermanĝo
- * 18.00 solena kultura vespero
(Dům kultury chemiků, Velká hradební 19)

Dimanĉa programo:

- * 7.00 komuna matenmanĝo'
- * 8.25 ekskurso en kastelon Velké Březno
(el stacidomo Usti-Střekov)
- * 12.30 komuna tagmanĝo (Adonis)

Surlokaj pagoj en la akceptejo:

Aliĝkotozito 50 Kč, tranokto ĉirkaŭ 160 Kč por nokto kaj persono en hospitala aŭ universitata tranoktejo. La komunaj manĝoj pagotaj individue al la kelnero.

Grava ŝanĝo: Hotelo Palace kaj la fervojista tranoktejo estis damaĝitaj de inundoj.

Aliĝojn akceptas:

S-ro Miroslav Smyčka, Kojetická 90,
CZ-400 03 Ústí nad Labem
Ĉeĥio, tel. (42)-047-553 2417
j.sema@tiscali.cz

Ideoj de Václav Vanc

La esperantista klubo Jiří Kořínek volas ankaŭ apliki ideojn de sia karmemora ano RNDr. Inĝ. Václav Vanc-patro (1919-2001), kiu estis kluba filmdokumentisto kaj konscienco. Du- aŭ trifoje jare li riproĉis, ke la klubo nenion faris por videbliĝi E-on ĉe vasta publiko, ke junuloj demandas “kio kaj por kio ĝi estas?”, dum aĝuloj miras “ĝi ankorau ekzistas?”. Ke ni ne penas gajni lerneajn instruistojn por la ideo de Komenio pri universala lingvo kaj homa interfratiĝo, pri justa egalvaloro de ĉiuj etnaj kulturoj, ke ni timas iri al instancoj kaj entreprenistoj peti subtenon por nia agado.

laŭ M.Smyčka

LANĈOV 50-jara

La fama Somera Esperanto-Tendaro en Lančov festis ĉijare la 50-an jaron de sia ekzistado. Ĝi ne plu estas vera tendaro, sed kabanaro, ĉar la proksima digolago servas kiel rezervojo de trinkakvo kaj la higienistoj malpermesis tendumadon. Proksimume antaŭ dudek jaroj la tendaro devis forigi la tendojn kaj instalii anstataŭ ili kabanojn (por 4-5 personoj), sed la tradician nomon ĝi konservis.

En la komencaj jaroj troviĝis sub tendo ankaŭ la kuirejo, poste la tendaro akiris por ĝi primitivan lignan budon, kiu fine - antaŭ trideko da jaroj - estis anstataŭigita per relative moderna konstruaĵo el lignopaneloj. La kuirejo fakte troviĝas en ĝia malantaŭa parto, la frontaj ejoj servas kiel oficejo, litaĵstokejo kaj manĝejo-klubejo. Kutime oni manĝas kaj instruas sub libera ĉielo, nur dum pluvo oni rifuĝas en la manĝejoj kaj en grandajn kabanojn.

La lavadon en la rivereto baldaŭ forigis dometo sur deklivo super la kuirejo, kun lavejo kaj necesejoj, ambaŭ aparte por virinoj kaj aparte por viroj. La higieno pliboniĝis,

tamen dum pluva vetero la deklivo iomete glitigas la piedojn.

Ĉiujare okazas tri etapoj de kursoj po du semajnoj. Dum la socialismo ĉiuj tri etapoj estis plenaj de esperantistoj (ĉ. 150 personoj por unu etapo), sed post 1989 la situacio malboniĝis. Falo de la fera kurteno malfermis la pordon por la angla kaj la intereso pri Esperanto grave mal-kreskis. Tamen la tendaro devas perlabori monon, ĉar al la vilaĝo Lančov necesas pagi imposton por ĉiu lito kaj ĉiu nokto.

Tial oni devis aranĝi ankaŭ la kursojn de la angla kaj de la germana, pro kiuj la intereso de esperantistoj ankoraŭ malpliiĝis. Oni proponas ankaŭ kursojn de la franca, rusa kaj hispana, kurseton de ŝako kaj pentrado, reikion (spirita ekzercado) ks. Esperanto fariĝis minoritato en la Esperanta tendaro. La organizantoj ĝojas, ke la kursanoj de la mondlingvoj almenaŭ aŭdas pri la internacia lingvo. La kursojn gvidas kutime junaj studentoj (intereso estas pri denaskaj parolantoj de instruata lingvo) kaj plej multaj kursanoj estas infanoj, kvankam la tendaro estas malfermita ankaŭ por plenkreskuloj sen limigo de aĝo.

Pozvánka na 10. sjezd Českého esperantského svazu

Vážení přátelé,

výbor Českého esperantského svazu (dále jen ČES) svolává v souladu se stanovami svazu 10. sjezd ČES na dny 15. - 17. listopadu 2002 do Prahy.

Místem konání je Kulturní centrum ZAHRADA v Praze-Chodově.

Program:

- pátek 15. 11. od 16.00 prezenze účastníků
 od 18.00 večeře
 20.00 slavnostní večer k 100. Výročí založení KE Praha
- sobota 16.11. 7.00 snídaně
 9.00 zahájení sjezdu a pracovní jednání
 12.30 oběd
 14.00 pokračování jednání sjezdu
 18.00 večeře
 19.00 taneční večer s předtančením a tombolou
- neděle 17.11. 8.00 snídaně
 9.00 jednání sekcí a komisí svazu
 (cizinci a další zájemci - prohlídka Prahy)
 11.30 oběd
 12.30 ukončení konference a odjezd účastníků

ÚČASTNICKÝ POPLATEK

Člen ČES - při platbě do 30. 10. 2002-150.- Kč, po termínu - 250.- Kč (členem ČES se rozumí člen v kategorii F - doživotní, nebo člen v kategoriích A, B, D a E, pokud má na rok 2002 uhrazen členský příspěvek - nejpozději v den zahájení konference). Nečlen ČES - při platbě do 30.10.2002- 250.- Kč, po termínu - 350.- Kč. Členové ČES do 30 let a nevidomí - do 30. 10. 2002- bez poplatku, po termínu - 150.- Kč. Čestní členové ČES a pozvaní hosté - bez poplatku.

STRAVA - od páteční večeře do nedělní snídaně - 220.- Kč

UBYTOVÁNÍ - v Domově mládeže, 2 noci - 400.- Kč.

VSTUPNÉ na večerní programy - 80,- Kč (účastníci sjezdu zdarma!)

Popis cesty k místu konání konference:

Popis cesty k místu konání sjezdu. **Pěšky** - ze stanice metra Chodov (trasa C) výstup "koleje - Jižní Město" - pokračovat ve směru ulicí Roztylská, asi po 300 m po pravé straně Julius Meinel - kolem (zůstane po levé straně), za tímto

objektem (roh restaurace Sluníčko) vlevo modrá budova - kulturní dům Zahrada. Cesta pěšky asi 10 min. **Autobusem** - ze stanice metra Chodov jednu stanicí autobusem 118, 154, 197, do stanice Jarníkova. Od stanice směrovka na Kulturní dům Zahrada.

Během sjezdu budete mít možnost zakoupit si esperantské knihy a další zboží ze zásob LIBROSERVA ČES, které bude výhradním prodejcem. Pokud chcete nabídnout k prodeji svoje esp. předmety nebo výrobky, pak jediné jeho prostřednictvím. Neesperantské zboží pouze se souhlasem výboru ČES.

Na místě bude možnost zaplatit si členské příspěvky ČES, UEA, sekcí a předplatné esp. časopisů - **POČÍTEJTE S TÍM!!!**

ÚHRADA sjezdových poplatků je možná těmito způsoby:

a) složením příslušné částky v pokladně kterékoliv pobočky Komerční banky a.s. na účet ČES u Komerční banky v Poděbradech č.ú. 3330 - 021/0100, variabilní symbol 10010, konstantní symbol 0379. Nezapomeňte požádat pracovníci pokladny, aby na výpise uvedla jméno plátce, uvedené an pokladní složence. Vklad je bez poplatku.

b) bezhotovostním převodem z Vašeho účtu - nezapomeňte uvést čísla obou symbolů a na přihlášce číslo účtu, ze kterého platíte! ! !

PŘIHLÁŠKY posílejte nejpozději do 30. října 2002 (rozhoduje datum pošt. razítka) na adresu svazu:

Český esperantský svaz, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI., 290 01 Poděbrady. Možno i faxovat (325 615 651) nebo použít E-mail: **cea.polnický@quick.cz**

Stornovací poplatky: při odhlášení do 5. listopadu 2002 (dle poštovního razítka) Vám bude odečteno 10 % ze zaplacené částky na nezbytné náklady, po tomto termínu 50%!

Těšíme se na shledanou v Praze

Věra Podhradská v.r.
předsedkyně ČES

Závazná přihláška na 10. sjezd ČES

Praha 15.-17. listopadu 2002

Příjmení:	Jméno:	Titul:
Adresa vč. PSČ		
telefon vč. předčísí	E-mail	
rok narození:	číslo OP (pro ubytování):	
číslo člen. průkazu ČES	vegetarián <input type="checkbox"/> ano <input type="checkbox"/> ne	

Přihlašuji se závazně na 10. sjezd ČES. Prohlašuji, že jsem si pozorně přečetl(a) pozvánku a souhlasím s podmínkami pořadatele. **Objednávku služeb uvádím na rubu této přihlášky.**

Způsob úhrady (zakřížkujte jednu možnost):

složeno v Komerční bance a.s. dne

uhrazeno bezhotovostně z mého účtu číslo dne

Objednávám následující:

Kompletní služby - 2x nocleh, stravování

Účastnický poplatek

člen ČES, platba	do 30.10. 2002
	po 30.10. 2002

členové do 30 let	do 30.10. 2002
a nevidomí	po 30.10. 2002

nečlen ČES, platba	do 30.10. 2002
	po 30.10. 2002

čestní členové ČES a pozvaní hosté

Dar svazu

Celkem k úhradě

Poznámka

Datum

(zakřížkujte žádané)

Kč 620,- ano ne

Kč 150,- ano ne

Kč 250,- ano ne

bez poplatku ano ne

Kč 150,- ano ne

Kč 250,- ano ne

Kč 350,- ano ne

bez poplatku ano ne

..... Kč

..... Kč

Podpis

Ĉijare aperis kursetoj de Esperanto en la unua kaj dua etapoj, en la tria etapo eĉ kursoj du. Venis ankaŭ eksterlandaj esperantistoj el Hungario kaj venus eĉ Afrikanoj, se la kondiĉoj por ili ne estus finance tro malfacilaj (30 mil kronojn por ĉiu persono garantie). Ĉu esperantistoj komencos reveni, montras la venontaj jaroj. Plej multaj gesamideanoj venis por la 10-a kaj 11-a aŭgusto, kiam okazis solena renkontiĝo de malnovaj tendaranoj-esperantistoj por festi la 50-jariĝon de la tendaro. Pragaj esperantistoj surprizis la organizantojn per donaco de tute novaj flagoj (ĉeĥa kaj Esperanta), kiujn oni hisis sur la tendaran maston dum sabata solena viciĝo. Alvenis ĉirkaŭ sepdeko da malnovaj "lančovanoj", kiuj tiamaniere renkontiĝas jam la kvinan jaron. Post la viciĝo ĉiuj foriris en la vilaĝon, kie en la vilaĝa oficejo estis aranĝita ekspozicieto de proksimume dek bildoj, kiujn en la tendaro pentris pentristoj profesiaj kaj amatoraj dum lastaj jardekoj. Vespera programo ĉe tendarfajro estis okazo por kantado kaj babilado. Dimanĉe ĉiuj forveturis, nur kelkajn horojn antaŭ la katastrofaj pluvoj. Sed kvankam la rivero Dyje elversigis en la proksima urbeto Vranov, la tenda-

ron la inundoj evitis.

La tendaro ricevis sponsoran financan donacon de la nove proklamita regiono Vysočina (Montetaro), al kiu apartenas la urbo Třebíč, sidejo de Esperanto-klubo, kies membroj la tendaron organizas (precipe la motoro de la klubo kaj tendaro Pavel Sittauer).

Miroslav Malovec

Inundoj en Ĉeĥio

Post kvin jaroj revenis al nia lando katastrofaj inundoj, kiuj tiam trafis ĉefe la nordan kaj mezan Moravion, dum ĉijare la ĉirkaŭaĵojn de la riveroj Vultavo kaj Elbo. Do Bohemion sudan (České Budějovice), mezan (Prago) kaj nordan (Ústí nad Labem).

Venis trioblo da akvo, ol estas la kapacito de ĉiuj digolagoj. Kelkaj vilaĝoj estis tute detruitaj, en la ĉefurbo plej multe damaĝitaj estis la kvartalo Karlín kaj la metroo.

Ni ankoraŭ ne havas informojn pri esperantistoj, kiujn la akvo trafis (krom likvidita librostokejo de KAVA-PECH).

La inundoj minacis ankaŭ grandan nacion kulturan heredaĵon, precipe librojn, kiuj nun atendas savon en fridejo.

Inundaj plagoj trafis ankaŭ Germanion, Aŭstrion, Hungaron, Pollandon, Francion kaj aliajn landojn.

mm

LIBROSERVO

Na skladě je několik posledních výtisků nového Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, které se expeduje pro členy ČES za 1 500,00 Kč + poštovné.

Dále je možno objednat:

J. Werner kaj kol.: Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj, za 110,00 Kč;

J. Foglar: La knaboj de Kastora Rivero, za 50,00 Kč;

K. Čapek: La Blanka Malsano, za 60,00 Kč; *Posledně 3 jmenované knížky se expedují za normálních podmínek Libroserva, tj. se slevami při odběru zboží při dosažení určité částky Kč.*

Novaj stampaĵoj



Okaze de la 55-a IKUE-kongreso en Kroměříž kaj 50-jariĝo de SET Lančov uzis Ĉeĥa Poŝto stampaĵojn de ing. arch. Karel Kuča kaj gravuristo Karel Pavlíček.

Insignoj EK Vítkovice



Esperantský klub Vítkovice, pošt. schr. 55, 703 00 Ostrava (kaj aliaj insignoj)

KLUBA VIVO

Brno: 4.9. Feriado per Esperanto; 11.9. Lerni kaj ellerni, 18.9. Libertempo kun senioroj; 25.9. Libeloj; 2.10. Salubra nutrado; 9.10. Nova biblioteko de Filozofia Fakultato; 16.10. Karel Čapek kaj TGM; 23.10. 55-a IKUE-kongreso; 30.10. Esperantlingva enciklopedio; 6.11. Ni ludu lingve; 13.11. Kio gravas?; 20.11. J.G. Mendel kaj genetiko; 27.11. Batalo kontraŭ lepro; 4.12. Sankta Nikolao en Francio; 11.12. Vojtěch Rakous; 18.12. Venas Kristnasko

Ostrava-Poruba: 24.9. Strategio de E-movado

Ostrava-Vítkovice: 25.9. Ĝoja podio de junularo Ostrava

Praha: 15.-17.11. Jubileo de la klubo

Třinec: 1.9. Tyršova ulice; 6.10. Kion faras statistikistoj; 3.11. Rememoroj pri Mongolio; 1.12. Kristnasko

IKUE-kongreso en ĉeĥa gazetaro

Dupaĝan artikolon *Malfermu la pordon al Kristo* de Antonín Bina presis *Naše rodina* - 34, 2002, ĉ. 36, p. 24-25, artikolon de Jan Kalný *Mezinárodní kongres katolických esperantistů* aperis en *Katolický týdeník* 13, 2002, ĉ. 32, p. 7 (11.8.), kaj *Esperantisté se sejdou už podruhé v Kroměříži* de Pavel Jačka en *Týdeník HIT Kroměřížska*, 1, 2002, ĉ. 29 (23.7.)

Ni petas pardonon

pro malfruigo de Starto 3/2002. La inundoj kaj la pintrenkontiĝo de NATO kaŭzis problemojn kun serĉado de tranoktejo por nia kongreso. Sen tranoktado ne eblis fini la aliĝilon kaj distribui la gazeton.

Estu pli pacienca, mi petas!

Mia loĝejo havas du ĉambrojn. La muro, kiu dividas ilin, ne havas pordon. Oni devas iri en vestiblon kaj eniri la duan ĉambron. Okazis, antaŭ kelkaj monatoj, ke ĉe mi eksonoris telefono. Mi estis en la alia ĉambro, mi ekiris do, sed ĉar mi havas malbonajn genuojn, kaj mi iradas kun bastono, mi ne iris sufiĉe rapide kaj la sonorado ĉesis kelkajn sekundojn, antaŭ ol mi atingis la aparaton.



Post du aŭ tri tagoj la sonorado ripetigis. Mi estis en la ĉambro, sed en la alia angulo. Mi prenis la parolilon, metis ĝin al la orelo, kaj aŭdis, ke la vokinto demetis la sian. Denove, post kelkaj tagoj, la sonorado aŭdiĝis. Mi faris ion en la vestiblo, ĉe la fornelo, ekiris, sed la sonorado denove ĉesis, antaŭ ol mi atingis la telefonon. La diferenco estis nur kelkajn sekundojn. Pasis kelkaj monatoj kaj la sonorado

ripetiĝis. Mia edzino estis proksime, ŝi prenis la parolilon kaj diris, ke mi estas en la necesejo. La telefonanto demetis la parolilon, sen prezenti sin. Denove do fino.

Mi supozas, ke temis ĉiam pri la sama persono, eble samideano, kiu vizitis nian urbon. Li ne konis do nian situacion. Mankis al li nur iom pli da pacienco. Se estis vere samideano kaj legis tiujn ĉi liniojn, mi petas, sonorigu ĉe mi denove. Mi nur tre escepte forlasas nian loĝejon. Ĉiuj telefonadoj okazis ĉirkaŭ la 13-a horo.

Adolf Staňura
"Domov"

penzion pro důchodce
Lidická 52c

736 01 Havířov - Šumbark



100 jaroj de KE Prago kaj ĈEA

Antaŭ 100 jaroj estis fondita Klubo de Esperantistoj en Prago, kiel dua nialande post Brno, fondita unu jaron pli frue. Ambaŭ kluboj formis bazon de tutlanda organizo, do ni povas fakte festi ankaŭ centjariĝon de nia asocio. Eĉ la unua gazeto *Bohema esperantisto* estis prezentita kiel komuna organo de ambaŭ kluboj, kvankam ĝin eldonadis Ĉejka en Bystřice pod Hostýnem.

En 1889 la 17-jara F. V. Lorenc prelegis pri Esperanto en la socialista kultura rondeto en la gastejo "U Pštrošů", en 1893 poeto Jan Neruda publikigis ironian felietonon "Ĉe entute iu povas inventi ian lingvon?", sed efektivan priesperantan informadon ni trovas nur en 1902 en ĵurnaloj *Pražský deník* (Praga ĵurnalo) kaj *Nájemník* (Loĝluanto). En junio prepara kunveno en la restoracio Konvinkt en la strato Bartolomějská akceptis statuton kaj sendis al la landa oficejo por aprobo. La 9-an de novembro la fonda kunveno de la klubo en la restoracio U Štajgrů en la strato Vodičkova elektis la unuan komitaton: Eduard Weinfurter (prezidanto), František Kühnl (vicprezidanto), František Bárth (sekretario), Josef Görner (kasisto), Eduard Kühnl (protokolisto), Stanislav Kostka Neumann (inventaristo) kaj

František Vaníček (bilibotekisto).

En 1904 formiĝis ankaŭ Esperantista Rondeto de Blinduloj en la Instituto Klar, kie instruis Karel Emanuel Macan, kaj Unua Virina Grupo Esperantista ĉe la Muzeo Náprstek. Ĉejaj esperantistoj kaj kluboj multiĝis kaj en 1907 fondis Boheman Union Esperantistan (BUE), el kiu estis eksigitaj membroj ne konsentantaj kun la maniero de gvidado (Ĉejka, Kamaryt, Hromada, Bouška k.a.); tiuj en 1908 fondis konkurencon organizon Bohema Asocio Esperantista, kiu daŭrigis eldonadon de la gazeto Bohema Esperantisto, dum BUE aperigadis Gazeton de Bohemaj Esperantistoj. En 1909 en kafejo Edison fondiĝis la germana klubo Esperanto-Verein Verda Stelo Prag.

Post la unua mondmilito la ekesto de Ĉeĥoslovakio kaŭzis uzadon de la vorto "ĉeĥo" anstataŭ "bohemo", kiun niaj esperantistoj antaŭ la milito rifuzadis (ankaŭ germanoj ne estas "dojĉoj" kaj angloj ne estas "inglišmenoj"). En 1919 unuiĝis la Pragaj esperantistoj en unu klubo kaj tutlandaj esperantistoj en 1920 en Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. La forton de nia tiama movado dokumentas la fakto, ke la 13-a UK estis invitita al Prago por 1921. En salonoj de Žofín sur la Slava Insulo kolektiĝis 2561 esperantistoj el 35 landoj kaj okazis tie ankaŭ la fonda kongreso de SAT.

El la riĉa laboro de Pragaj esperantistoj ni povas ĉi tie mencii nur kelkajn. En 1924 okazis unua esperantlingva prelego en Ĉs. Radio (D-ro A. Pitlik prezentis Ĉeĥoslovakion kiel turisman landon). En 1927 la ŝtatestro Tomáš Garrigue Masaryk aŭspiciis en Prago Konferencon *Paco per Lernejo*, en kiu Esperanto estis oficiala lingvo. Post la dua mondmilito Prago transprenis el Brno elsendojn de Verda Stacio kaj prezentis operojn *Vendita Fianĉino*, *Najado* kaj *En la Puto* en bonegaj tradukoj de Tomáš Pumpr (ĉiuj konserviĝis, Najado eĉ sone).

Post likvido de la asocio en 1952 ĉiuj kluboj aktivis memstare ĝis 1969, kiam en Brno estis refondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kies sidejo fariĝis kompreneble Prago. Sufiĉe reprezentajn ĉambrojn akiris la asocio en la strato Jilská kaj la klubo post la angulo en la strato Vejvodova. En ambaŭ imponis la plej granda kolektaĵo de Esperanto-libroj en Ĉeĥio, iniciatita de Jaroslav Šustr, kies nomon la biblioteko portas. Post 1989 la domoj estis redonitaj al la veraj posedantoj, kiuj Esperanton elpelis por luigi la ejojn al pli lukraj firmaoj. La Šustr-biblioteko estis transportita al Esperanto-muzeo en Česká Třebová, kie ĝi estis profesie prilaborita.

Tamen la demokratio ebligis al niaj esperantistoj fondi ankaŭ firmaojn, el kiuj KAVA-PECH nun apartenas al

plej gravaj eldonejoj kaj kongresaj agentejoj en Esperantio. En Prago aktivas esperantaj poetoj Eli Urbanová kaj Čestmír Vidman, vivis tie ankaŭ jam forpasintaj Štefo Urban, Josef Rumler, Jiří Karen kaj aktorino Eva Seemannová. Kunlaboras ĉeĥaj poetoj Věra Ludíková kaj Zdenka Bergrová. Kun Prago estas ligitaj karmemoraj esperantistoj Julie Šupichová, Rudolf Hromada, Tomáš Pumpr, Jaroslav Mařík k.a.

En 1996 Prago gastigis la 81-an UK en Kongresa Centro kaj ekde 1998 reviviĝis ankaŭ kolokvoj pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko (KAEST).

(Laŭ preparata broŝuro de Jiří Patera kompilis Miroslav Malovec)

Ne forgesu KAEST 2002

Aliĝis ĝis nun pli ol tridek partoprenantoj el BA, BG, CZ, DE, DK, FR, GB, HU, NO, SK, USA kaj ankoraŭ eblas aliĝi, eĉ kiel preleganto, sed necesas rapide sendi la aliĝilon kun resumo ĝis 50 vorta por la programkajero. Temo: **elektronikaj rimedoj** (+ terminologiaj problemoj).

KAEST okazos unu semajnon antaŭ nia kongreso (8.-10.11.2002). Aliĝilojn sendu al P. Chrdle (vidu p. 2).

Al KAEST jam aliĝis la usona iniciatinto de enciklopedio Vikipedio.

3-a Eŭropa Medicina Esperanta Kongreso

EMEK en Sud-Hungarlanda urbo Hódmezvásáhely (21.-26.8.) invitis krom hungaroj ankaŭ delegaciojn el Pollando, Latvio, Bulgario kaj Ĉeĥio. La delegaciojn bonvenigis internacia estraro de Monda Yumeiho Societo (Katerina Faragó, Imre Ferenci kaj prezidanto Masaiuki Saionji) kaj urbestra oficejo, kie estis krom ĉefaj urbanoj ankaŭ regiona TV kaj ĵurnalistoj.

Dum kongreso estis sciencaj prelegoj kaj prezento de filmoj pri sukcesoj de hungaraj kuracistoj kaj rekapabligitaj laboristoj. Venontan tagon okazis ekzamenojn de Yumeistoj por diversaj gradoj. Diplomon ĉi tien ricevis ankaŭ du ĉeĥaj Yumeistoj, kvaran gradon s-ano Khun Zdeněk kaj trian gradon s-ro Petr Štefan, ambaŭ el regiono Hořice v Pod.

Nun interesiĝantoj pri ellerno de tiu ĉi kuracmetodo povas ricevi en nia lando la unuan kaj duan gradojn pere de semajnaj kursoj ankaŭ en ĉeĥa lingvo.

Khun Zdeněk

NOVA ESPERANTO-DOKUMENTO APERIS

UEA aperigis novan kajeron el la serio "Esperanto-dokumentoj". Tio estas artikolo de Robert Phillipson "Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj", kiu analizas kiel iuj naciaj lingvoj iĝis "internaciaj". Estas traktata la temo de egalecaj lingvaj rajtoj rilate al la praktiko de multlingveco en la Ligo de Nacioj, la Unuiĝintaj Nacioj kaj Eŭropa Unio.

Phillipson atentigas, ke la nuna lingvopolitiko de EU estas "inercio", senkonsulta transiro al trilingva, dulingva, aŭ eĉ unulingva sistemo.

La ED estas 37-a kaj ĝi estas akir-ebla de la CO de UEA - ĉi-foje nur en Esperanto.

Dezirantojn traduki la artikolon en aliajn lingvojn oni invitas anonci sin
ĉe roy@co.uea.org.



AL LINGVA DEMOKRATIO! ALVOKO AL LA ESPERANTISTARO

kaj aparte al la membroj de
UEA / TEJO / ILEI

Karaj membroj (kaj nemembroj), ni dankas ĉiujn tiujn el vi, kiuj dum la pasinta jaro kunlaboris kun siaj asocioj por la plenumo de la taskoj de la labor-plano. Laŭ via memoro ni estas speco de "garantia komisiono", kiu certigas, ke la labor-plano estos kunlabore plenumata de la membroj de niaj tri organizaĵoj. La labor-plano emfazas la jenajn prioritatojn:

- * informado
- * instruado
- * utiligado
- * plijuniĝo
- * tutmondiĝo
- * profesiiĝo

Ili estas en si mem klaraj kaj vi povas detale legi en la labor-plano mem, kiel ili estas komprenataj. Dum la pasinta jaro multo estis realigata en la kampo informado kaj papera kaj reta kaj kelkaj progresoj estis realigataj en ĉiuj aliaj labor-kampoj. En la nova jaro ni bezonas doni apartan atenton al "instruado", "utiligado" kaj "plijuniĝo". Ni varme konsilas, ke en ĉiu lando kaj en ĉiu organizaĵo estu almenaŭ unu

homo, kiu respondecas pri la realigo de la labor-plano kaj aliĝas al la listo, kie ĝuste oni diskutas pri tio, per malplena mesaĝo al la adreso **<al-lingva-demokratisubscribe@yahoogroups.com>**.

Ni kopias frazon de la pasintjara mesaĝo, kiu restas daŭre aktuala: "Unu lasta afero devas esti klara al ĉiuj: ni ne bezonas konkurenci kaj batali inter ni. Ni estas ĉiuj laborantoj por la sama idealo preter kelkfoje tro rigidaj asociaj limoj. La labor-plano, kiun vi legos, emfazas la rolon kaj de UEA kaj de TEJO kaj de ILEI, kaj de ĉiuj aliaj esperantistaj asocioj, kaj ni ŝatus en ĉiuj landoj vidi kunlaboron, eĉ se kun la bezonata memstareco de ĉiu organizaĵo."

Ni faros nian komunan eblon por helpi vin kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

Renato Corsetti, prezidanto de UEA
Holger Boos, prezidanto de TEJO
Mauro La Torre, prezidanto de ILEI
Trevor Steele, ĝenerala direktoro de UEA

Renato Corsetti, Via del Castello, 1
IT-00036 Palestrina, Italujo
<renato.corsetti@uniroma1.it>

VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO

Tiel nomiĝas la eminenta verko de akademiano Boris Kolker, ĵus eldonita de UEA. La libro apartenas al malofta ĝenro de perfektigaj kursoj de Esperanto, kiuj pro klaraj kialoj estas multe malpli oftaj ol la startigaj lerniloj. Aparte ĝin elstarigas la fakto, ke ĝi estas samtempe gvidlibro pri la Esperanta kulturo.

"La ambiciaj celoj de tiu ĉi neordinara lernolibro estas instrui krear regadon de la literatura lingvo kaj kreskigi emocian ligitecon al Esperanto", - skribis Boris Kolker, prezentante la libron.

Tio estas la dua eldono de la libro, radikale relaborita kaj internaciigita. La instruado okazas per la uzo de verkoj de Ludoviko Zamenhof, Claude Piron, Istvan Nemere, Julio Baghy, John Wells, Marjorie Boulton, Albert Goodheir, Emilja Lapenna, Cezaro Rossetti, Lorjak, Kalomano Kalocsay kaj dudeko da aliaj konataj kaj ne tre konataj, sed interesaj aŭtoroj.

La tekstojn akompanas E-temaj fotoj, zorge elektitaj el la foto-arkivo de la Centra Oficejo.

La antaŭa Generala Direktoro de UEA Osmo Buller, dum kies direk-

torado la libro komencis prepariĝi al la presado, skribis pri ĝi tiel: "La libro estas abunde ilustrita kaj fakte ne ekzistas alia libro por simila celo, kiu povas rivali kun ĝi."

MEMBRARO DE UEA EN 2001

En 2001 por la membreco en UEA pagis esperantistoj el 122 landoj, i.a. 6428 individuaj kaj 14889 aligitaj, kio sume estas 21317 membroj*. La tendenco de la IM malkreski daŭras, kvankam tre modere en 2001. Ĉi-jare ĝi estas, ĉiukaze, kontraŭita de la kresko de aligitaj membroj, tiel ke la saldo estas pozitiva. Estas tro da faktoroj implikitaj, pro kiuj estas tre malfacile eltiri pozitivan juĝon el ĉi tiu pozitiva saldo, kiu ŝuldiĝas ĉefe al la abrupta kresko de aligitaj membroj en unu lando kaj al modestaj kreskoj en aliaj landoj.

Por kompletigi la bildon ni informu pri tio, ke la individuaj membroj de UEA je la 1-a de julio estis 5365. Je la sama dato de 2001 ili estis 6127. Por havi fidindan ideon pri la suma nombro de individuaj membroj en 2002, tamen, estas necese atendi la UK-on dum kiu multaj membroj aliĝas.

Renato Corsetti

VIKIPEDIO

Jen estas supervido de ĉefaj artikoloj enkondukitaj en la retan enciklopedion ĝis nun.

Turismaj interesajoj

* BOHEMIO * BRNO * ERCMONTARO (Blatenský Vrch, Boží Dar, Horní Blatná, Klínovec, Lupaj Truoj, Potůčky, Kyselka, Roko de Šemnice) * HELFŠTÝN * JÁCHYMOV (Urbodomo, Reĝa Monfarejo, Taleroj ktp.) * KARLOVY VARY (Altajo de Cerva Salto, Urba Parko de Antonín Dvořák, Imperial, Sankta Lukaso, Mueleja Kolonaro Zíték, Ortodoksa Pregejo, Pošta Korto, Pupp, Richmond, Urba Teatro, Thermal, Tri Krucoj, Kastela Turo ktp.) * KAŠPERSKÉ HORY * KROMĚŘÍŽ * LITOMYŠL * LOKET (Urboplaco, Slavkov-Arbaro, Svatoš-rokaro) * MONAĤEJO DE TEPLÁ * MORAVIO * MOST * NOVÉ HAMRY * OHŘE * PERNINK * PLEŠIVEC * PRAGO (Historio, Malnova Urbo, Malnovurba Placo, Malnovurba Urbodomo, Astronomia horloĝo, Nova Urbo, Hradčany, Vyšehrad ktp.) * VULTAVO * TISOVSKÝ VRCH

Ĉefaj verkistoj

*Ĉefverkoj de la Ĉeĥa Literaturo * Jakub ARBES * Zdenka BERGROVÁ * Otakar BŘEZINA * Josef ČAPEK * Karel ČAPEK * Svatopluk ČECH * Karel Jaromír ERBEN * Julius FUČÍK * Jaroslav HAŠEK * Václav HAVEL * Karel HAVLÍČEK Borovský * Bohumil HRABAL * František HRUBÍN * Alois JIRÁSEK * Jiří KAREN * Karolo la IV-a * Johano Amoso KOMENIO * František KOŽÍK * Milan KUNDERA * Věra LUDÍKOVÁ * Jiří MAHEN * Karel Hynek MÁCHA * Josef Svatopluk MACHAR * Vladimír NEFF * Božena NĚMCOVÁ * Stanislav Kostka NEUMANN * Josef RUMLER * Karel SABINA * Karel TOMAN * Vladislav VANČURA * Čestmír VIDMAN * Jan WELZL * Zikmund WINTER * Julius ZĚYER

Pentrado

* Věroslav BERGER * Josef LADA * Karel PURKYNĚ * Majstro Theodorik

Arkitekturo

* Ferdinand FELLNER

Muziko

* Josef MYSLIVECEK * Bedřich SMETANA * Antonín DVORAK * Leoš JANACEK * Bohuslav MARTINU

Esperanto-verkistoj

* Jan FILIP * Jaroslav MAŘÍK * František OMELKA * Karel PÍČ * Stanislav SCHULHOF * Julie ŠUPICHOVÁ * Štěpán URBAN * Eli URBANOVÁ * Valda VINAŘ

Esperanto-tradukistoj

* Rudolf HROMADA * Stanislav KAMARYT * Theodor KILIAN * Jiří KOŘÍNEK * Francisko Valdomiro LORENZ * Moraviaj Esperanto-Pioniroj * Tomáš PUMPR * Vladimír VÁŇA * Josef VONDROUŠEK

Esperanta kulturo

* Ĉeĥa Esperanto-Asocio * Ideala Esperanto-Biblioteko * KAVA-PECH * SET Lančov * Starto * TRAKT * Verda Stacio

Scienco

* Aragonito * Arkitekturo * Efiko de Purkinjo * Hamstro * ISA * Mineralogio * Pedagogio * Universala Dekuma Klasifiko

Sciencistoj

* František BEHOUNEK * Jan Evangelista PURKYNĚ * Eugen WUSTER

Lingvistiko

* Ĉeĥa lingvo * Cigana lingvo

Politiko

* Tomáš Garrigue MASARYK * Jan MASARYK

Atentinda poemaro

La faka katedro de Silezia Univerŝitato en Opava, kiu interalie okupiĝas pri pollingva literaturo, ricevis interesan libron skribitan en la pola kaj en Esperanto, kiu jam laŭdire estis envicigita en Guinness-Libron de Rekordoj. La dulingva libro aperis en Svisujo jam en la j. 1998, tamen mi ĝis nun ne renkontis ĝin inter literaturaj referaĵoj des pli en legintaĵoj. Pri ĝia aŭtoro Jan Stanislav Skorupski oni skribas dorspaĝe: "... (aŭtoro) skribis pli multe da sonetoj ol ĉiuj konataj poetoj resume en la tuta historio de literaturo." Tiun ĉi deklaron pravas subtitolo de la libro: 732 sonetoj dulingve skribitaj dum 126 tagoj en 1995. Ja vere, la nekredeble nombra poemkolekto aperis en du pola-Esperantaj volumoj. La unua nomiĝas "Tempo", la dua havas polan nomon "Potem", kio signifas en la internacia lingvo "Poste", kaj ĝi estas anagramo de la unua libro. Ĉiun tagon de la jaro prezentas du diversaj sonetoj. Kompreneble, tralegi ĉiujn unu post la alia estas super forto de ordinara leganto - do oni kutime elektas poemojn ligitajn kun iel grava tago de la leganto mem. Ekzemple la 15-a de decembro rilatas al Zamenhof, la aliaj estas iom personaj de la aŭtoro, sed ankaŭ rilatas ĝeneralajn aferojn. La poemoj estas diversnivelaj, kelkaj bone impresaj, kelkaj estas nur ludoj

kun vortoj. Tamen la versaro legindas almenaŭ por iuj tagoj, kiuj ĉu persone, ĉu ĝenerale iel signife rolas.

kov.

Jon Mirande:

La Baptofilino,

el la eŭska tradukis Joxemari Sarasua, eldonis Fonto 2002, 94 p.

La eŭskan nacion en provinco de Hispanio ni konas pro terorismaj atakoj de ETA, batalanta pri memstareco kaj sendependeco. Estas dubinde, ĉu tia metodo estas la ĝusta, ĉar kiu nacio dezirus havi registaron konsistigitan el murdistoj? Male la ekzemplo de Hindio sub Gandio aŭ nia reĝimsanĝo en 1989 pravas, ke sen perforto eblas atingi pli multe. Estu kiel ajn, la eŭskajn lingvon, literaturon kaj kulturon ĝenerale konas preskaŭ neniu. Fonto nun prezentas unu el la ĉefverkoj de la eŭska literaturo, kies apero en 1959 estis same skandala, embarasiga kaj kontraŭdira kiel la aktivecoj de la eŭskaj patriotoj.

Jon Mirande Aipasorho (1925-1972) naskiĝis el eŭskaj gepatroj en Parizo kaj la eŭskan lingvon li ellernis nur kiel plenkreskulo. Tiam li jam estis oficisto ĉe la franca Ministerio pri Financoj kaj komencis interesiĝi pri preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj kaj iliaj literaturoj. La eŭska fariĝis lia koringvo, en kiun li tradukis aŭtorojn kiel Poe, Kafka, Heine, Schiller, Keats k.a.

En siaj propraj verkoj li ŝatis provoki la ĝeneralan moralon, kio plene esprimiĝis en la novelo *La Baptofilino*. Junulo akceptas en sian domon orfan parencinon Teresa, kiun neniu el la parencaro volas. Kiam li estas tridek-jarulo kaj la knabineto 11-jara, li enamiĝas al ŝi. Konstatinte, ke lia fianĉino Isabela malamas la infanon, volas elpeli ŝin el la domo tuj post la geedziĝo, li rompas la edziĝpromeson, elpelas la fianĉinon kaj loĝigas la knabinecon en sia dormoĉambro.

Nun sekvas erotikaj scenoj, interveno de la parencaro, kiu timas makuligon de la bona nomo de la familio, kaj tragedia fino.

La esperantigo de Joxemari Sarasua estas suverena, sen stilaj mallertaĵoj, sed ne konvena por komencantoj, ĉar la tradukisto uzas lingvaĵon plenan de neologismoj kaj nekutimaĵoj. La provoka enhavo kaj la lingvaĵo akordiĝas.

- mm -

Jan Werner:

Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj.

Lingvoj: Esperanto kaj ekvivalentoj en la angla, germana, ĉeĥa. Prova versio, eldono de la aŭtoro, werne@tiscali.cz, 40 paĝoj A4.

La terminaron ellaboris Jan Werner (CZ) kun kolektivo: Willi Branden-

burg (DE), Fabien van Mook (NL), Dorde Obradoviĉ (SI), Josef Trojan (CZ), la recenzon faris Claude Longue-Épée (FR) kaj Bronislav Ĉupin (RU). La celo de la terminaro estas ne nur unuecigi la esprimadon en konstrufakaj kaj koneksaj ekonomiaj kontaktoj, sed ankaŭ doni ekzemplon de modele ellaborita terminaro. La Esperantaj terminoj estas kompletigitaj per difinoj kaj ankaŭ per ekvivalentoj anglaj, germanaj kaj ĉeĥaj. Fine de la broŝuro troveblas registroj en unuopaj lingvoj.

La terminaro konsistas el ses partoj:

A. Betono kaj ties komponentoj (*Bazaj nocioj. Ligentoj. Volumenaĵoj. Ingredientoj. Akvo.*). **B. Specoj de betono** (laŭ diversaj kriterioj). **C. Tehnologio de betono** (*Fabrikado de betonmiksaĵo. Modifaj procedoj en la fabrikado de betono. Enmetado kaj prilaboro de betono. Maŝina miksa ekipaĵo. Transporta ekipaĵo. Rimedoj por prilaboro de betonmiksaĵo. Ŝelaĵoj, specoj kaj procedoj.*) **D. Bazaj proprecoj de betonmiksaĵo kaj betono.** **E. Armaturo** (*Materialo kaj formoj de armaturo. Pretigo de armaturo. Armaturo el la vidpunkto de transigo de fortoj. Armaturo de prestreĉita betono. Arango kaj procesoj de armaturo.*) **F. Betonaj strukturoj kaj ties partoj - bazaj statikaj nocioj** (*Betonaj elementoj. Betonaj strukturoj. Bazaj nocioj el la statiko de betono.*). Sume 225 terminoj.

Miroslav Hlaváč Pampeliška

Hontema arbaristo (1)

Scenaro por Teatro de Malgrandaj Formoj

Junulara kvaropo kun gitaro: Ni aktoros por vi rakonton pri hontema arbaristo. Li ne estos nigra ĉasisto kun hipnotaj okuloj, sed knabo amanta la naturon.

La nova praktikanto Oldik eniras en la kancelarion de la arbara distrikto kaj aŭdas la arbarestron murmureti lian kanton:

Panjo, fariĝi arbaristo,
estis mia revo,
sed ĉi tiuj paperoj
restas damna devo.

Oldik: Bonan matenon, kamarado arbarestro, via humoro devas esti perfekta, ĉar vi grumbletas belegan melodion. Sendube vi preparis por mi fajnan laboron.

Arbarestro: Ne pensu. Oldik, ke kiel *famulus-adlatus* vi havos okupon kvazaŭ feriadon. Ne zorgu pri salajro, sed ĝuu mildan traktadon kaj freŝan aeron. Vi ricevos 60 minutojn por unu horo, higienan ekipaĵon post ĉiu arbo kaj se pluvos, ankaŭ duŝo ne mankos. Estus juste, se vi ankoraŭ pagus por la freŝa aero, sed ni lasos tion al vi kiel premion kune kun fungoj kaj mirteloj, por ke vi ne pensu, ke ni estas rabistoj. Najadon ankoraŭ nekisitan vi certe trovos por vi en la varmega somero ie apud la lago.

Oldik: Mi konas kanton pri varmega somero. Se vi permesos, mi lernigos ĝin al vi.

(Oldik komencas deklami kaj poste kanti. La arbarestro korektas la melodion.)

Vagas mi ĉirkaŭ lago en somera varmo
ŝajne sen intereso pri knabina karno.
Fortuno kaj spertoj al mi certe mankas,
tial nenia cervino ĉe mi flankas,
kvankam kreskis al mi dume longa barbo,
esperoj miaj forbrulis kiel karbo.
Aĝaj aproj fajre gapas,
vento sian kordon skrapas.

Arbarestro: Nu, kanti vi scias sufiĉe bone, tamen nun temas pri tio, kiel vi sukcesos morgaŭ kun la segilo, ĉar ĝi kapricas. Svingu vin kun ĝi en la riparejon. Tien kuru, reen marŝu kaj samtempe vi povas melodii dum la tuta vojo.

Oldik: Ĉefo, mi prefere biciklos, por povi ankoraŭ viziti mian Bojenjon.

Li biciklas kun segilo,
pensoj vagas ĉe knabino,
riparejo jam proksimas,
riparistoj tie sidas.

Riparejo. Riparisto Jarouš kun subuloj amike lunĉas.

Oldik: Sendas min la ĉefo, ke vi ĉion alian lasu kaj ordonu ripari la segilon, kaj tuj kaj senprokraste, aŭ li faros skandalon ĉe la entreprena komitato.

(Daŭrigota)

Lingvaj ludoj kaj enigmoj (11)

Solvo de la ĉenoj el la antaŭa numero:

19. estro trovis viskion

20. mia amiko kolere rediris

Kiel konate ekzistas en la Esperanta alfabeto literoj, kiuj havas supersignojn ŝanĝantajn iliajn sonojn. Familiare oni nomas ilin "ĉapel(et)oj". Vortoj aŭ vortgrupoj, kiuj diferencas nur per la ĉapelo(j), estas fundamento de la enigmo, kiun oni povas nomi

ĈAPELUMO

Jen kelkaj tiaj duopoj: sango - ŝanĝo, tuŝi - tusi, ŝerci - serĉi, reĝa spuro - regas puro. La formo de la enigmoj povas esti simpla, en kiu la divenotaj vortoj estas aluditaj per streketoj aŭ punktoj kun difino. En la rimajoj ili estas ordinare kaŝitaj en okulfrape signitaj (preskaŭ)-sinonimoj.

Jen kelkaj ekzemploj:

--- perokula perceptado de teksto

-- ^ - socia deviga regulo

Solvo: *lego - leĝo*

Ĉu taŭgas nura poma

al bongustema reĝa ?

Solvo: *mosto - moŝto*

Send-servaro tre utilas:

je leter' al fora mondo

sekve de kelk' da tagnoktoj

venos la respondo.

Solvo: *poŝta reto - post areto*

Kaj nun vi mem provu diveni:

21. En la saman akvon

neniu dufoje ----,

ĉar antaŭ ol fari tion,

la akvo jam pluen ----.

22.

Ekskurso okazos al la Verda Monto,

ekstartos je oka ni de ŝtona ponto,

al vi la irplano konformos tutcerte,

do vi al startejo aliros paŝlerte.

Josef Cink

Amo-finaĵa mamamamo

Virino kun sia mamamamo

Estas nure bela damo,

Paradize por Adamo

Ĝi estis la panoramo.

Ekscitiga korp-reklamo

Ĉef-rolas dum homo-amamamo.

Se ĝi mankus, estus dramamamo,

Sciis ĝin jam Abrahamamamo.

Oriente en Siamamamo,

Ĉe marborda Amsterdamamamo,

Virkor' brulas eĉ kun flamamamo,

Se aperas ĉi ornamamamo.

Ĉe araboj en islamamamo,

Leĝe sonas la proklamamamo:

Vidu vir' en neniama,

Eĉ se ĝia pezo gramamamo.

Mondkonatas jena fama,

Pri valora vir-programamamo:

Enmanigi ĝin sur tramamamo,

Por ĉiam, se kilogramamamo.

Ernö Geleta

Kondolencoj

* La 8-an de julio 2002 forpasis **Bruno Vogelmann** (1909-2002), honora membro de UEA, kunaŭtoro de *Internacia Ekonomika Fakvortaro* kaj aŭtoro de *La Nova Realismo* (tradukita el Esperanto al 25 naciaj lingvoj, inkluzive de la ĉeĥa), laŭreato de premioj Degučĉi (1992) kaj FAME (1993).

* La 19-an de julio 2002 mortis **Nikola Aleksiev** - Honora Membro de UEA kaj ĈEA. Honora Prezidanto de MEM, aŭtoro, tradukinto kaj redaktoro de pluraj libroj kaj artikoloj, sindona esperantisto kaj aktiva sociaganto.

* La 24-an de julio 2002 forpasis **Jaromír Źák** el Brno.

Memore al Jaroslav Źák

Meze de feriosezono adiaŭis membroj de EK Opava kun Jaroslav Źák, kiu neatendite mortis 2. 8. 2002 post mallonga, sed grava malsano en la aĝo de 71 jaroj. Li naskiĝis 8.4.1931 en Rokytnice super Rokytka, distrikto Třebĉ. Tie li studis Komercan Akademion kaj unuan fojon renkontis E-on pere de sia instruisto Th. Kilián. Lia intereso pri muziko kaj literaturo kune kun profunda kredemo lin post matur-ekzameno forblovis al limregiono de Hluĉín, distrikto Opava, kie li ekinstruis en baza lernejo. Sekve li kleriĝis en pedagogio eksterforme en universitato en Olomouc. Al Silezio li restis fidela tutan sian vivon instruite diversloke en la regiono ĝis 1970, kiam li pro sia kredo - simile kiel lia edzino - estis eligita el la lernejsistemo kaj laboris

poste kiel hejtisto en Opava-buĉejo ĝis sia emeritiĝo. La viglan kontakton kun esperantistoj en Opava li ligis en tempo de la Praga Printempo. Tamen tre baldaŭ - lige kun sia ekspostenigo - li cedis el ĉiuj siaj multflankaj aktivadoj inkluzive de E-o por ne endanĝerigi ilin. Post aŭgusto 1968 ĝis la politika renverso en 1989 li tamen aktive praktikis E-on pere de riĉaj kontaktoj kun fremdlandaj e-istoj, el eksterlando li liveris diversajn multajn presajojn, librojn kaj aliajn materialojn, kvankam li estis akre observata de ŝtata polico. Privatan kontakton kun la enlanda movado peris al li nur la subskribinto. Ankaŭ al siaj infanoj li izolite instruis E-on. Lia filino Hana kompilis eminentan studentan fakan laboron pri la nomo de Lidice en la mondo, kiu atingis la duan premion en la tutŝtata konkurso. Ĉiujn materialojn ŝi gajnis danke al eksterlandaj esperantistoj. Samideano Źák nur post 1989 plene dediĉis sin al la loka movado en Opava kaj fariĝis la plej oferema klubano. Li gvidis kursojn, organizis ĉiujare serion da prelegoj pri E-o en lernejoj en Opava. Li helpis dum la 81-a UK en Praha kaj ĉe aliaj diversaj okazoj. Li daŭre korespondadis kun vico da eminentaj e-istoj, al kiuj li dissendadis multajn informajn kaj fakajn materialojn laŭ ties bezono - ekz. kun K. Kurisu el Japanio. Lian eseon pri la ĉeĥa literaturo li tradukis ĉeĥen - eldonis KAVA-PECH en 1996. Kontribuo de samideano Jaroslav Źák al loka kaj al la ĝenerala movado estas neforgesebla.

Vlast. Koĉvara

KALENDARO 2002

4.-6.10. 15-a Internacia kultura festivalo Ústí
8.11.-10.11. Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), Elektronikaj rimedoj - sub aŭspicio de UEA - Dobřichovice
15.-17.11. 10-a ĈEA Kongreso - 100-jara jubileo de KE Prago, Kultura Centro Zahrada, Praha-Chodov

7.12. 21-a Ĉeĥa-Saksa Tago en Ústí n. L.

Jak platit svazu

Nejlevnější způsob platby pro Vás i pro svaz je přímá platba u pokladny v kterékoliv pobočce Komerční banky. Vyplníte pokladní složenku (jsou v pokladně k dispozici) pečlivě ve všech kolonkách (viz vzor Starto 2/2001, str.67) - tedy: měna účtu: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, měna hotovosti: Kč, částka: slovy kolik platíte, jméno a příjmení, adresa. RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenný seznam. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379. Seznam čísel:

06940 ČES

06941 UEA

06942 předplatné Starta bez členství

06943 dary ČES

50100 sekce mládeže

50200 sekce železničářů

50400 sekce pedagogickí

50401 písemný kurs začátečníci

50402 písemný kurs pokročilí

50403 členství ILEI

50404 Paroliga kurso

50405 svazové zkoušky

50500 sekce přátel SAT

50600 sekce šachistů EŠLI

50700 sekce sběratelů

50800 sekce nevidomých LIBE

50900 sekce zdravotníků UMEA

51000 sekce křesť. esp. KELI

51100 sekce katol. esp. IKUE

70100 komise pro tisk a inf.

80200 ediční fond

80300 propagace v tisku

80400 fond Tilio

Pokud jste poukázali platbu a nejste si jisti, zda jste řádně vyplnili své jméno, napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

Neznáte adresu?

Pošta nám vrátila zásilky se Startem těchto členů ČES s poznámkou, že se odstěhovali. Pokud znáte jejich novou adresu, sdělte ji tajemníkovi svazu.

Mikulášek Libor, Komenského 891, 697 01 Kyjov

Blažková Frant., Mrštíkova 886, 500 09 Hradec Králové

Navrátilová Zdenka, Novosady 248, 751 14 Dřevohostice

Gratulo.

S-anino Markéta Kazderová el Liberec estis solene proklamita doktorino de ĝenerala medicino la 28-an de junio 2002 en historia aŭlo de Karolineo en Prago.

Periodikum Českéého esperantského svazu (32. ročník)

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:
Pavel Polnický, ČES**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(32-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ
rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 9 eŭroj
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto**

Presis: OPATISK Opava

ISSN 1212-009X

F259

MALOVEC MIROSLAV
BOSONOŽSKÁ 15
625 00 BRNO